
Aperas sesfoje jare. Jarabono 56 steloj, 14 ned.gld., 5us.dol.,80 din.

ENHAVO:

- W. Lukaszewicz: Solenado de la 500-a naskiĝdatreveno de N. Kopernik
C. Iwaniszewska: Nikolao Kopernik - Toruńano
W.M.A. De Smet: Rimarkinda kazo de nenormalade sangovazo
C. L. Melo: Kial patrino kaj feto ne rifuzas unu la alian?
M. F. Figueroa: Degustumado, mezurado de sensaj laĝetoj... de gustoj

SOLENADO DE LA 500-A NASKIĜDATREVENO DE NIKOLAO KOPERNIK

/W. Lukaszewicz, Toruń, Pollando/ +/

La 19-an de februaro 1973. Toruń kune kun la tuta pola popolo festos la 500-an naskiĝdatrevenon de Nikolao Kopernik, kies persono kaj verko estas propraĵo de la tuta civilizita homaro. Pro tio la solenaĵoj omaĝe al Kopernik en la 1973. jaro havos la tutmondan karakteron kaj patronos al ili UNESCO laŭ la rezolucio de sia Plenuma Konsilantaro akceptita en novembro 1971. La Granda Kopernika Jubileo estos ne nur omaĝo al unu el la plej grandaj homaj geniuloj, sed ĝi ankaŭ formos konvenan atmosferon por disvastigo kaj pliprofundigo de la internacia kunlaboro en la sfero de la scienco, kulturo kaj plifirmigo de la paco en la mondo.

La proksimiĝantaj solenaĵoj havas specialan signifon por la plua evoluo de la toruna Universitato, precipe por ĝia plukonstruo ĝis la 1980. jaro. La Universitato dum 26 jaroj de sia ekzisto fariĝis grava centrejo de la scienco kaj kulturo radianta al la tuta Norda Pollando.

Dum kvin jaroj /V.1967. - IV.1972./ oni konstruis sur la tereno de la "universitata urbeto": 3 Studentajn Domojn /1030 loĝlokoj/, 2 Porasistantajn Hotelojn /344 loĝlokoj/, Manĝejon /2200 lokoj/, Rektorejon, Studumon de Fremdaj Lingvoj, Universitatan Sanprizorgejon kun Duonsanatorio, 2 Gimnastikejojn. Ĝis la fino de la kuranta jaro estos finaranĝitaj: Aŭlo /950 lokoj/, Ĉefa Biblioteko por 1,5 milionoj da volumoj /Kemia Instituto/ la I-a parto, kaj en la jaro 1973. konstruaĵo por la Fakultato de Biologio kaj Sciencoj pri la Tero.

La nova toruna "universitata urbeto" - la unusola en Pollando - jam hodiaŭ formas pulsantan centron de la Almae Matris Copernicanae prepariĝante al ekcepto de kelkmiloj da en - kaj eksterlandaj gastoj en la periodo de intensiĝo de la jubileaj solenaĵoj, t.e. en septembro kaj oktobro de la sekvonta jaro /1973/.

+/ Prof., d-ro, rektoro de la Universitato en Toruń, membro de la pola Parlamento

NIKOLAO KOPERNIK naskiĝis 19 II 1473 en Toruń, mortis 24 V 1543 en Frombork, la granda pola sciencisto, astronomo, matematikisto, ekonomiisto, kuracisto, kreinto de la heliocentra teorio de la universkonstruo. Filo de Nikolao, bonstata krakova komercisto, kiu post la alligo de Toruń al Pollando translokiĝis (antaŭ 1460) al tiu ĉi urbo. Familio de Kopernik devenis de kie Kopernikfamilio elmigris al diversaj urboj de Pollando i. a. al Krakowo. Post la morto de la patro (ĉ. 1483) Nikolao estis edukata de la patrina frato Lukaso Watzenrode, posta episkopo de la regiono Varmia. En la j. 1491—1495 Kopernik studis en la Krakova Akademio, tiam vaste konata en la mondo, aktiva centro de la astronomiaj studoj kaj centro de humanisma penso. Sendita en la j. 1496 por juraj studoj al Bolonia, li okupiĝis ĉefe pri astronomio; 9 III 1497 li observis tie eklipson de la stelo Aldebaran pere de Luno, kio konfirmis la dubojn de Kopernik pri la praveco de la ĝisnuna teorio pri astra movado. En la j. 1501 Kopernik revenis por kelkaj monatoj al Pollando, poste, en la sama jaro, li denove forveturis al Italujo por studi juron kaj medicinon en la Padva universitato. Doktoran diplomon pri eklezia juro li ricevis an la j. 1503 en Ferrara. Fine de la 1503 j. Kopernik revenis definitive al Pollando (al Varmio). En la j. 1504—1510 li estis sekretario kaj hejmkuracisto de sia onklo Lukaso Watzenrode kaj restadis ĉefe en Lidzbark. En la j. 1509 li aperigis prese en Krakovo sian latinan tradukaĵon de grekaj leteroj de Teofil Symokata. Fine de la 1510 j. li setlis en Frombork, sidejo de la varmia kapitulo kiel kanoniko (distingita jam en la j. 1470); tie li daŭrigis la astronomiajn observojn kaj prilaboris sian ĉefan verkon. En la j. 1516—1519 kaj en la unua duono de la 1521 j. li restadis en Olsztyn kiel administranto de la episkopeja posedaĵo; dum la pol-kruckavalira milito (1520—1521) Kopernik defendis la kastelon en Olsztyn kontraŭ Kruckavaliroj. Tiam li ekinteresiĝis pri la ekonomiaj aferoj kaj tio rezultigis lian projekton de la monreformo (1517). Memorigaĵo pri tiu afero prezentita de Kopernik dum la kunveno de regionrepresentantoj en Toruń (1519) estis plilarĝigita (1526) kaj prezentita en formo de traktato titolita *Monetae cudentae ratio*. En la traktato Kopernik formulis la principojn de la monreformo, apogitaj je projekto de monplibonigo kaj egaligo de la prusa kaj pola valuto. Li opinis, ke nur la mono posedanta stabilan valoron certigas disvolvon de produktado kaj disvolvon de la eksterlanda komerco; li formulis la ekonomian principon, laŭ kiu malvalora mono forigas la pli valoran; tiun ĉi principon oni nomis poste la principo de Gresham, al kiu oni malprave atribuis prioritaton de ĝia malkovro.

Ĉirkaŭ la j. 1510 Kopernik prilaboris la ĉefan skizon de la heliocentra teorio pri la univerkonstruo en la disertacio konata kiel *Comentariolus*; ĝi ne estis presita, sed cirkulis en kopioj, el kiuj 2 oni malkovris nur en la XIX jc.

La ĉefa verko de Kopernik, enhavanta la prezentadon de astronomio laŭ aspekto de la revoluo ĉirkaŭ la akso kaj ĝia cirkulado kune kun la aliaj planedoj ĉirkaŭ la suno, estis prilaborita en la j. 1515—1533. Malgraŭ tio, ke Kopernik ne scipovis decidi publikigon de la rezultoj de siaj sciencaj esploroj, la sciigo pri la nova teorio pri la universkonstruo komencis disvastiĝi en Eŭropo kaj atingis Romon; En la j. 1533 ekkonis ĝin tiama papo, Klemenso VII, kaj en la j. 1536 la kardinalo Nikolao von Schönberg sendis al Kopernik leteron, en kiu insistis lin al publikigo de la verko kaj petis sendi mankopion al Romo.

En la j. 1539 venis al Frombork Georg Joachim von Lauchen, nomita Rheticus, profesoro de matematiko en la universitato en Witembergo, por ekkoni la novan teorion de la universkonstruo. Li instigis Kopernikon publikigi prese la verkon. La ekstrakto de tiu ĉi verko, konata sub mallongigita titolo *Narratio Prima*, preparita de Rheticus, ekaperis prese en Gdańsk en la j. 1540. En 1541 j. Rheticus, forveturante el Frombork, kunportis laŭ

konsento de Kopernik kopion de lia aŭtografo kaj transdonis ĝin por presado en Nurenbergo. La presadon prizorgis nurenberga teologo Andreas Osiander. Forigis li, sen scio de Kopernik, lian antaŭparolon kaj anstataŭis ĝin per sia propra, ne subskribita, en kiu klarigis, ke la teorion de Kopernik devas rigardi nur kiel hipotezon ne nepre veran, sed plifaciligantan kalkulojn. Tio kontraŭstaris vidpunkton de Kopernik, klare prezentita en dediĉletero al la papo presita komence de sama libro. La verko aperis en la j. 1543 titolita *De revolutionibus orbium celestium* (Pri la revoluo de ĉielsferoj). Kiun titolon donis al la verko la aŭtoro mem, oni ne scias, ĉar en la manuskripto, skribita per mano de Kopernik, mankas la titolkarto. Post morto de Rheticus la manuskripto apartenis laŭvice al kelkaj personoj kaj fine, en XVII jc., ĝi troviĝis en Pragó, en la biblioteko apartenata al la grafo Nostica, kie ĝi restis pli ol 150 jarojn ne rimarkita. Kvankam en la j. 1788 aperis la unua mencio pri ĝi, sed nur en la j. 1840 ĝi estis precize priskribita. En 1953 j. la Ĉeĥoslovaka registaro transdonis la manuskripton al Pollando. Nun ĝi troviĝas en Jagiellona Biblioteko en Krakovo. La dua eldono de la kopernika verko aperis en Basel (1566) kaj la tria en Amsterdamo (1617). La unua pola eldono (la kvara laŭvice, prilaborita de J. Baranowski) aperis en Varsovio en 1854 j. latinlingve kaj en la pola traduko.

La verko de Kopernik revoluciigis la koncepton pri la universkonstruo kaj komencis la novan astronomion. Ĉar ĝi skuis firmigitajn de jarcentoj opiniojn pri universkonstruo, ne tuj ĝi ĝuis la pozitivan akcepton en la scienca mondo. Ne akceptis la teorion de Kopernik la plej granda astronomo de la 2 duono de XVI jc. Tycho de Brahe. Li asertis, ke nemo-viĝanta Tero estas la centra astro de la universo, la Suno kaj ĉirkaŭkurantaj ĝin planedoj cirkulas ĉirkaŭ la Tero. Fine de la XVI kaj komence de la XVII jc. la teorio de Kopernik akiradis tamen pli kaj pli da adeptoj, ĝian firmigon plej multe kontribuis G. Bruno, J. Kepler kaj Galileo Galilei. Teorian kronigon ricevis la teorio en la principo de la ĝenerala gravito formulita de J. Nevton. La unuan observpruvon de la termovo ĉirkaŭ la Suno havigis J. Bradley malkovrinte en la j. 1725—1728 aberacion de la luno.

Ankoraŭ dum la vivo de Kopernik lian teorion akre kontraŭstaris M. Luter, Ph. Melanchton kaj J. Kalvin, kiel neagordiganta kun la biblia teksto. La katolika eklezio komence ne prezentis la oficialan opinion pri la Kopernikteorio, kaj la liberalismaj ĉefaj eminentuloj de la eklezio tre interesiĝis pri ĝi, parte pro tio, ke la aŭtoro estis kanoniko, kaj dediĉis sian verkon al la papo kaj en la anonima antaŭparolo la teorio estis prezentita kiel hipotezo. Post la koncilio en Tridento, kiu komencis la akran kontrereformacion agadon, la vidpunkto de la ekleziaj aŭtoritatuloj pri la teorio de Kopernik komencis ŝanĝiĝi kaj post la publikaj eldiroj de G. Bruno kaj malkovroj de Galileo Galilei la katolika eklezio ekvidis en la teorio danĝeron por la religia mondkoncepto, do la Kongregacio de Indekso eldonis (1616) la dekretan malaprobantan *De revolutionibus...*; el la indekso de la malpermesitaj libroj la verko de Kopernik estis forstrekita nur en la j. 1828; laŭ la decido de la papo Pius VII.

En la tuto de sia koncepto Kopernik kunligis la universalan humanisman vidpunkton kun strikte scienca, libera de metafizikaj anticipoj, sinteno al esplorataj simptomoj. Lia heliocentra teorio fariĝis la elirpunkto al la nuntempa kosmologio; kvankam la teorio senpere rilatis nur la strukturon de la Sunsistemo, tamen ĝiaj peraj konsekvencoj influis preskaŭ la tuton de la hompenso, komencante la ŝangon de mondkoncepto, kiun ĝuste oni nomis Kopernikrevolucio. Ĝi alkondukis al revoluciigo de ĉiuj branĉoj de la tiama scienco kaj ŝanĝis la aprobatan ĝis tiam valorigon, donis bazon por disvolvo de la nuntempa civilizacio kiun karakterizas la sciencinfluo en ĉiuj sferoj de la individua kaj kolektiva vivo.

Amikeco kaj kunlaboro ligas la Universitaton de Nikolao Kopernik kun la famaj italaj altlernejoj, en kiuj studis N.Kopernik. De post pli ol ses jaroj ekzistas la "ĝemel-urba kunlaborkontrakto"/tn. "gemellaggio"/kun la universitato en Ferrara, kie N.Kopernik akiris la doktoriĝan diplomon /31.V.1503/. Estas ekligitaj senperaj rilatoj kun la universitatoj en Bolonjo kaj Padovo, en kiuj estas fonditaj, simile kiel en Ferraro, Firenco kaj Romo, komitatoj por solenado de la 500-a naskiĝdatreveno de Nikolao Kopernik kaj estas entreprenitaj scienc esploraj laboroj, ligitaj kun lia restado kaj agado en Italujo.

En Krakovo, kie en la jaroj 1491-1495. studis N.Kopernik okazos en februaro 1973. Solena Ĝenerala Konferenco de la Pola Akademio de la Sciencoj dediĉita al la Kopernika temaro. Laŭ la rezolucio de la Plenuma Konsilantaro oni festos la 500-an naskiĝdatrevenon de N.Kopernik per aranĝo en la domo de UNESCO en Parizo, de solenaĵo sub la nomo "Omaĝo al Kopernik" kun ĉeesto de scienculoj el diversaj landoj kaj kontinentoj.

Ankaŭ sub la senpera protektado de UNESCO estas planataj en Toruń de la 5-a ĝis la 12-a de septembro 1973. gravaj internaciaj aranĝoj: la unua sub la nomo "Colloquia Copernicana", kies kunorganizaĵoj estas: la Internacia Unio de Historio kaj Filozofio de Scienco kaj la Komitato de Historio, Scienco kaj Tekniko de la Pola Akademio de la Sciencoj /la gvidtemo "Homo kaj kosmo"/; la dua - Internacia Renkontiĝo de Ĵurnalistoj kaj Sciencaj Verkistoj. La 4-an de septembro komencos siajn debatojn en Varsovio la XV Eksterordinara Kongreso de la Internacia Astronomia Unio /ankaŭ patronata de UNESCO/, kies fakkunsidoj kaj kolokvoj okazos en Toruń /de la 5-a ĝis la 8-a de septembro 1973/, en Varsovio /3 fakkunsidoj/, en Krakovo /1 fakkunsido/.

Granda festo por la Universitato de N.Kopernik en Toruń estos de la 1-a de novembro 1973. - dato de la solena inaŭguro de la kopernika stud-jaro kun ĉeesto de la plej eminentaj ŝtataj aŭtoritatoj kaj eksterlandaj gastoj, ligita kun la solena transdono de la titoloj "doktoro honoris causa" kaj transdono al la altlernejo por la utiligado de novaj konstruaĵoj en la "universitata urbeto" /2.X.1973/.

La Granda Kopernika Jubileo portos ankaŭ riĉan eldon-rikolton. La Pola Akademio de la Sciencoj, sciencaj asocioj kaj altlernejoj en Pollando preparas multajn sciencajn publikaĵojn.

Oni ankaŭ preparas la komunan publikaĵon sub la egido de la Internacia Unio de Historio kaj Filozofio de la Sciencoj, dediĉitan al la percepto de la heliocentra teorio en la monda scienco.

La Ministerio por Kulturo kaj Arto de la Pola Popola Respubliko preparas plenlongan filmon pri N.Kopernik /realigas ĝin la geedzoj Petelski, konataj filmreĝisoroj/ kaj kelkajn dokumentajn kaj klerigajn filmojn pri tiu ĉi figuro kaj ligitaj kun ĝi lokoj.